

## STATISTIKA TABELO DE L'ESPERANTA VORTARO (radikoj, afiksoj, finaĵoj, literonomoj)

kompilita de Paul CILIGA laŭ la originalaj dokumentoj kaj detale  
komentita en naŭ postnotoj.

### I. Parto Oficiala (Unua Libro por Rusoj, Fundamento kaj Aldonoj). 2768 + 1761 = 4529 oficialaj radikoj.

Litero ĉe vortkomenco	1887	1893	1905	1909	1919	1922	1929	1934	1935	1953	1958	O.A. sumoj	Fund. + O.A.; sumoj
	U.L. „por Rusoj”	U.V.	Fund.	1-a	2-a	3-a	4-a	5-a	6-a	-end’ + 7-a	1958 (preta en 1914) + 1958		
A	49+1	158+1	171	101-1	49	29+1	13	1	6	2	201	372	
B	43	115	120	42	35	7	3	2	2	3	94	214	
C	7	33	36	12	11	5	1	—	—	—	29	65	
Ĉ	22	43	47	1	1	1	1	—	—	—	4	51	
D	34	98	104	43	31	13	4	—	—	—	91	195	
E	32+2	79+2	86	43	22	12	3	—	—	1+4	85	171	
F	55	157	163	40	19	6	2	1	—	1	69	232	
G	23+1	82+1	87	24	20	4	3	—	2	4	57	144	
H	6	12	13	1	2	—	1	—	—	—	4	17	
H̄	23	54+1	58	22	25	4	4	—	1	1	57	115	
Ĥ	—	5	6	—	—	—	—	—	—	—	—	6	
I	32+1	71+2	75	27	15+1	9	11	—	1	—	64	139	
J	11	23+2	28	5	—	3	—	—	—	—	8	36	
J̄	3	6	8	1	—	1	—	—	—	—	2	10	
K	91+1	349+1	358	95	76	23	19	1	2	2	218	576	
L	41	111	116	16	14	3	8	—	—	—	41	157	
M	42+2	150+4	158	61	47	10	4+1	—	1	3	127	285	
N	34	61	67	13	15	4	3	—	—	—	35	102	
O	33	57	59	20	18	4	3	—	—	2	47	106	
P	92	282	294	71	59	11	16	2	—	4	163	457	
R	32	114	117	37	20	13	3	—	—	—	73	190	
S	77	225	234	60	57	13	8	1	2	—	141	375	
Ŝ	27	52	54	6	3	2	1	—	1	—	13	67	
T	51+1	142+1	151	42	37	7	1	—	—	3	90	241	
U	11	27	28	5	3	1	1	—	—	—	10	38	
Ŭ	—	—	1	—	—	—	—	—	—	—	—	1	
V	45+1	113+1	118	15	7	4	4	—	3	—	33	151	
Z	1	9	11	3	—	—	1	—	—	1	5	16	
<b>Sume</b>	<b>917 +10<sup>2</sup></b>	<b>2628 +16<sup>2</sup></b>	<b>2768<sup>3</sup></b>	806 -1	586 +1	189 +1	118 +1	8	21	1 +30	<b>1761</b>	<b>4529</b>	

<sup>1</sup> Plie 3 en la franca kaj 1 en la angla eldonoj. Entute do 931. Krome 15 aliaj aperis en la broŝuro mem, t.e. ekster la vortolisto. (Vidu postnoton a.)

<sup>2</sup> Eksterville en la vortareto algluita al la broŝuro kaj same en U.V.

<sup>3</sup> El kiuj 100 en la Ekzercaro, 3 en la Gramatiko, kaj 21 en la Antaŭparolo.

### II. Parto Ne-oficiala (Plena Vortaro de Esperanto, 2a eldono, 1934 plus Suplemento, 1954).

2488 + 953 = 3441 ne-oficialaj radikoj.<sup>1)</sup>

Litero ĉe vort- komenco	P.V.	Supl.	Sumo	Litero ĉe vort- komenco	P.V.	Supl.	Sumo
Afiksoj	12	—	12	(Vidu postnoton e, ĉe-fine.)			
A	272	34	306	K	301	75	376
B	113	30	143	L	101	26	127
C	45	11	56	M	146	86	232
Ĉ	9	3	12	N	48	23	71
D	145	39	184	O	43	30	73
E	203	28	231	P	163	126	289
F	162	28	190	R	69	49	118
G	134	31	165	S	162	110	272
Ĝ	5	2	7	Ŝ	15	18	33
H	81	29	110	T	90	85	175
H̄	4	1	5	U	12	12	24
I	78	22	100	Ŭ	—	—	—
J	16	11	27	V	48	25	73
J̄	8	11	19	Z	3	8	11
<b>Sume</b>	<b>2488</b>	<b>953</b>	<b>3441</b>				

Oficialaj + Ne-oficialaj Radikoj: 4529 + 3441 = 7970.

(El la Oficialaj Radikoj 20 mankas en „Plena Vortaro”).

Pri ĉi tiu temo ankaŭ vidu P. Ciliga : „Universala Vortaro kaj Ofici-  
alaj Aldonoj”, *Franca Esperantisto* No. 183, p. 51/52 (1959), en kiu,  
tamen, troviĝas korektendaĵoj<sup>2)</sup>. Oni konsultu ĉi-sube la postnotojn.

<sup>1)</sup> Malsame difinitaj vortoj, troveblaj en ambaŭ partoj, apartenas al la kolumno „P.V.”.

<sup>2)</sup> Rimarko de la Redaktoro: En ĉi tiu artikolo en *Franca Esperantisto* s-ro Ciliga konkludas ke „la transskriboj *jesaul’* kaj *vojevod’* elok-  
vente pravas ke sola korekta estas la analoga *sovjet’* (cetere trovebla  
en la Zamenhofa traduko de la „*Gimnazio*” de Ŝalom A l e j h e m, p. 60)  
anstataŭ la fuŝa transliteraĵo *sovet’*, sklave kopianta la originalan ne-  
fonetikan ortografion. Laŭ *soviétique, soviet, sovietico, sowjet, szovjet,*  
*sovjetski*, ktp. ankaŭ en Esperanto oni *devas* (kursivigo de C.) adekvate  
apliki la saman sistemon, konforme al la principo de internacieco kaj  
la Zamenhofa modelo, anstataŭ persiste erari uzante mehanike faritan  
*kalkeon* [ĉu ne: *paŭsaĵon?* — W. P. R.]”.

Ni ne diskutu nun kiu formo estas preferinda en la nuna momento:  
*sovet* aŭ *sovjet*. Ŝajnas al mi nur, ke ni neniel *devas* uzi la formon kun  
j. Esperanto en tiaj aferoj ne estas tre konsekvenca. Kie estas, ekz., la  
konsekvenceco en jenaj kazoj: *percepti* - *koncipi* - *ricevi*; *akiri* - *kon-*  
*keri*; *teni* - *abstini*? (Vidu postnoton g. — P. C.).

## Komentaj postnotoj de la kompilinto:

a) Kiel rimarkigis Couturat kaj Leau („*Les Nouvelles Langues Internationales*”, 1907, p. 25, piednoto 2), Zamenhof dekomence „fundamentigis” sian unuan libron de 1887; efektive en „*Aldono al la Dua Libro*” (permesita de l’ cenzuro la 9.I. 1889<sup>1</sup>), fotoreproduktita de „*Esperantista Centra Librejo*”, 1925) li skribis: „Por ke la lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi [...] oni devis krei komunan fundamenton, sur kiu ĉiuj povus labori. Tia komuna fundamento por la „Lingvo internacia” devas esti mia unua broŝuro” (O. V. p. 33): tiele li oficialigis la bazon de l’ poste verkota „*Universala Vortaro*”, dum la ekzercaro de l’ *Dua Libro* servis kiel modelo por la definitiva *Ekzercaro*, tria parto de la „*Fundamento de Esperanto*”.<sup>2</sup>)

„*Bibliografio de Internacia Lingvo*” (1929) de s-ro Stojan memorigas, ke la t.n. *Unua Libro* aperis en du eldonoj, permesitaj de la cenzuro la 21-an de Majo kaj 31-an de Dec. 1887<sup>1</sup>); la dua eldono aperis sen la „devizo”, citita je p. 32 en la unua parto de „*Historio de la lingvo Esperanto*” (1923) de prof. Privat. Plie s-ro Chomette malkovris varianton de l’ unua eldono („*Esperanto*”, 1954, p. 278), kiu iom diferencas de la ĝenerale konata teksto, kiun s-ro Setälä reproduktis en 1948 kaj kiun mi uzis por miaj esploroj. Privata letero de s-ro Chomette (12.VII.1959) precizigas i.a. kelkajn malsimilaĵojn; ekz-e en lia varianto, *propon’* aperas ankaŭ en la vortarfolio por Rusoj, dum ĝi mankas en la menciita reprodukto. Krome, artikolo de d-ro Albault, „*Unua kaj Universala Vortaroj*” en „*Franca Esperantisto*”, 1959, No 184, p. 72, atentigas pri 4 pliaj radikoj: *brut’*, *kaf’*, *pres’* (vortaro por Francoj), kaj *propon’* (vortaro por Angloj), kiun mi ne enalkulis ĉe tiu por Rusoj. La unuaj tri el ĉi tiuj radikoj enestas ankaŭ en la Pola, kaj ĉiuj kvar en la Germana, Hispana kaj Sveda vortaroj.<sup>3</sup>) Oni rimarku, ke ĉiu vortarfolio indikas la popolon al kiu ĝi estis destinita. La fina nombro estas do 931, kaj krome majusklitaj popolnomoj.

b) Per letero de la 29.XI.1959 s-ro Setälä konfirmis, ke en la unua eld. de „*Universala Vortaro*”, p. 49, troviĝas la radiko *viper’* same kiel en „*Plena Vortaro Rusa-Internacia*” (1889, p. 47) kaj en „*Meza Vortaro Internacia-Germana*” (1889, p. 72), kion mi estis memoriginta en No 185, p. 47, de „*Franca Esperantisto*” (1959). Tiu ĉi unua eldono, pre-

<sup>1</sup>) Laŭ la „malnova stilo”; oni aldonu 12 tagojn al ĉiuj cenzurdatoj de la 19a jarcento (kaj 13 por la 20a jc.) por trovi la daton laŭ la okcidenta kalendaro.

<sup>2</sup>) Pri la diferencoj inter ambaŭ ekzercaroj vidu je p. 42 kaj 88 en „*Lingvo kaj Vivo*” (1959) de Prof. G. Waringhien. Detala kaj kompleta komparo ankoraŭ mankas.

<sup>3</sup>) La vortareton por Germanoj represis L. Einstein en 1888 („*La lingvo internacia als beste Lösung.....*”); la supre menciitaj 4 pliaj radikoj ankaŭ tie troviĝas.

sita ĉe Gins, estis permesita de la cenzuro la 30.VI.1893, sed ial ricevis la daton 1894 sur la interna kaj ekstera titolpaĝoj. Jen redakcia noto el „*Esperantisto*”, 15a de Sept. 1893, p. 131 (bedaŭrinde preterlasita en O.V.): „En la fino de Aŭgusto eliris jam el la presejo la multajn fojojn demandita „*Universala Vortaro*” ... (kiu) prezentas la tradukon de la tuta „*Meza Vortaro*” ... Ankaŭ por ne-esperantistoj tiu ĉi seslingva kompara vortaro prezentas certan intereson ... Oni povas ĝin ricevi ĉe L. Zamenhof”. Poste aperis ĉe Kelter tri pliaj stereotipaj eldonoj, kun *vipur’* (je p. 68). S-ro Wüster je p. 68 de „*La Oficiala Radikaro*” (1923) donis la formon *viper-o*, menciante en piednoto, ke laŭ poŝtkarto de Zamenhof (8. Okt. 1910) *vipUr-* en la Fundamento estas preseraro anstataŭ *vipEr-*; tamen en surgluita „ĝustigo” li atentigas, ke „Zamenhof skribis jam la 10.III.1908 leteron, en kiu li esprimas sian opinion, ke la oficiala formo estas *vipur-*”. Efektive ni legas en „*Originala Verkaro*” (p. 557): „La historion de la vorto „*vipuro*” mi nun jam bone ne memoras. Sed ĉar en la lastaj eldonoj de la universala vortaro troviĝas ne „*vipero*”, sed *vipUro*, tial mi tiun formon akceptis en la „*Fundamenton*” ... la vorto (eble pro simpla preseraro) hava(i)s du formojn”. Konklude evidentiĝas, ke tiu ne-intencita formo penetris pro nura hazardo en UV, ĉar alia presisto ol tiu de l’ unua eldono kulpis simplan eraron, kiun Zamenhof tiutempe ne rimarkis. La Akademio povus solvi la problemon per oficialigo de paralela formo *vipEr’*, same kiel iuj vortoj, kiujn ĝi akceptis, havas du ortografiojn. (Pri ili vidu ĉi-sube postnoton f.)

c) Jam en 1912 s-ro Stojan „malkovris” (en „*Oficiala Gazeto*”, No 41, p. 306) du vortojn en la *Ekzercaro*: *k(ompan)io* kaj *krestomatio*; ĉi-lastan citas ankaŭ la supre menciita broŝuro de s-ro Wüster (je p. 34). Tamen la eldonoj de l’*Ekzercaro*, aperintaj ĉe Gins, *Centra Oficejo* kaj *Centra Librejo* ne havas la reklamtekston pri „*Fundamenta Krestomatio*”, kiun Hachette kaj K-io aldonis ĉe la fino (1905); la itala eldono (1907) klare disigis tiun reklamon per dika streko kaj aldonis italan tradukon; sed ĉiukaze temas pri teksto fremda al la *Fundamento* kaj trovebla en iuj eldonoj, nek unuaj, nek lastaj, pro la tiama graveco de tiu verko por perfektigemuloj.

ĉ) Laŭ egaligo en „*Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana*” kaj piednoto, je p. 27 en la broŝuro de s-ro Wüster, pri la vorto *jurist-o* oni povas konkludi, ke temas pri memstara radiko, kiu iĝis kunmetaĵo nur post akcepto de *jur’* (3-a OA); tamen dum la komputado mi preterlasis tiun vorton, ĉar jam la unuaj legantoj de l’*Ekzercaro*, konantaj la sufikson *-ist’*, povis malkombini la vorton *juristo*, eĉ se Zamenhof ne antaŭvidis tion.

Ankaŭ aliaj vortoj en UV estas kunmetaĵoj, kvankam laŭ Wüster tio ne estas ebla: *firm’o*, *pro’cent’* kaj *re’sum’* ne estas memstaraj radikoj en UV. Nur kun la detalaj analizoj de R. de Saussure aperis

striktaj vortfaraj reguloj, dum *Zamenhof* tre elaste aplikadis siajn principojn, aparte en la unuaj jaroj, kiam tradicio kaj logikemaj gramatikistoj ankoraŭ ne regis la lingvouzon.

d) Jen distribuo de la propraj nomoj, fundamentaj kaj oficialigitaj: *UV*: 28 plus 1 (*Esperanto*, en la titolo kaj antaŭnoto je p. 2) = 29. *Ekzercaro*: 30. *Gramatiko*: 2. *Antaŭparolo*: 2. Entute: 63.

La ciferoj de *UV* inkluzivas la monatonomojn kaj la radikon *koran'* (majuskla nur en la tradukoj), kie la komenca minusklo rezultas tre probable de preseraro. En la „*Meza Vortaro*” oni ja legas *Koran'* kun majusklo, same kiel en „*Plena Vortaro Rusa-Internacia*”.

1-a *OA*: 3. 2-a *OA*: 2. 3-a *OA*: 1. 4-a *OA*: 1 (*Amor-o* estas propra nomo laŭ la tradukoj). Entute: 7. Sume ekzistas nun 70 oficialaj propraj nomoj, el kiuj 13 (monatnomoj kaj *amoro*) iĝis komunaj.

e) Prof. *Cart* informis (4.VII.1921) s-ron *Wüster* pri la erareco de l' enlistigo en la 2-an *OA* de *prozodi'* (trovebla jam en la 1-a *Oficiala Aldono*). Same *aŭtokrat'* (2-a *OA*) erare reaperis en la 7-a *OA*.

Kelkaj vortoj, nun rigardataj kiel kunmetaĵoj, troviĝas kvazaŭ radikoj en la 1-a kaj 3-a *OA*: *kalkanum'* kaj *patriotism'*; *idealism'* kaj *realism'*. Ili mankas en „*Oficiala Klasika Libro*” (1924) de prof. *Grosjean-Maupin*, dum „*Oficiala Vortaro*” (1937) de *Grenkamp* notis nur la vorton *idealismo*. Cetere jam „*Meza Vortaro*” (p. 32) indikas sub la radikoj *kalkan'* la kunmetaĵon *kalkan'um'*. Post la oficialigo de *-ism'* la vortoj, en kiuj ĝi aperas kaj kies radikoj estas jam Esperanta, estas sentataj kiel kunmetitaj; la sama fenomeno povas okazi, kiam pli multajn internaciajn afiksojn sankcios la Akademio. La problemoj pri distingo inter afiksoj-vortfariloj (aktivaj afiksoj) kaj afiksoj-analiziloj (pasivaj, etimologiaj *pra-afiksoj*) fariĝis tre aktualaj en kunligo kun la normigo de la scienca nomenklaturado.

Al tiu ĉi kategorio apartenas ankaŭ la 12 afiksoj, troveblaj ne en la korpo de „*Plena Vortaro*”, sed aparte listigitaj je p. 12. Oni ne forgesu aldoni ilin al la ne-oficialaj radikoj, same kiel oni atentis la 20 radikojn el la 7-a *OA*, kiuj entute mankas en tiu ĉi verko.

f) Statistika esploro de nia *leksiko* (= malkombino de *leksikologio*, kun signifo „vort-tuto”, diference de *leksikono*, kiu estas libro) montriĝis ofte erariga; la ciferojn de mia unua artikolo pri *UV* kaj *OA* mi korektis poste en Suplemento kaj Eratumo („*Franca Esperantisto*”, No 184, p. 72-73 kaj No 185, p. 93). Tamen detala kontrolo de ĉiu cifero montriĝis necesa por forigi la lastajn erarojn, tiel ke nur la nuna statistika tabelo estas plene fidinda je tiu rilato. Jen aldona informo: en la 1-a *OA* *analogi'* ne plu estas oficiala<sup>4)</sup> de post 12.V.1923; en tiu *OA*

<sup>4)</sup> Anstataŭ *analogi'(o)* estas nun oficiala *analog'(a)*; laŭ letero de prof. *Cart* al s-ro *Wüster* (2.III.1924) ĉi-lastaj radikoj estas konsidereblaj kiel postĝinto de la 3-a *Aldono*. (*Suplemento* de Junio 1932 al „*La Oficiala Radikaro*”, 1923). Konsekvence mi aldonis tiun (ŝanĝitan) radikojn al la listo de la 3-a *OA*.

aperas 56 fundamentaj radikoj, kaj 4 en la 2-a *OA*<sup>5)</sup>. Karakteriza por la 3-a *OA* estas la akcepto de radikoj kun du ortografioj por la sama uzo: *anarhi/anarki*; *arh.../ark...*; *kateh.../katek...*; *teĥnik/teĥnik*; la unua el ili estas konforma al la etimologio kaj al prononco en novgreka kaj kelkaj slavaj lingvoj, parte ankaŭ en la germana. Ankaŭ en la 7-a *OA* troviĝas tia paro: *oligarĥ/oligark*. Kompreneble dum la komputado mi nur unufoje notis ĉiun paron, ĉar temas pri la sama vorto.

g) Antaŭ ol rekomendi la formon „*sovjet*”, trovitan ĉe *Zamenhof*, mi konstatis, ke seriozaj gazetoj, kiel „*La Praktiko*” kaj „*The British Esperantist*” uzas ĝin; ankaŭ s-ro *Gregor* preferas la formon *transskribitan* laŭ la internacia uzo. La kialo de tiu ortografio estas jena: en rusa lingvo la vokalo *e* moligas (palataligas) la antaŭan konsonanton; en „*La Esperantista Laboristo*” (No 71, Sept.-Okt. 1958, p. 8) mi rimarkigis, ke tiun fenomenon oni notas science per apostrofo, sed ke nek la naciaj lingvoj, nek Esperanto adoptis tiun rimedon: oni preferas transskribi la aŭditan molecon (palataligon) per aldono de „*j*” (aŭ „*i*”), anstataŭ meĥanike, laŭlitere kopii la originalan vorton.

Temas do pri problemoj aparte, kiu rilatas nur la manieron Esperantigi rusdevenajn internaciigintajn vortojn. Tio havas absolute nenion komunan kun la nekonsekvencaj formoj de latindevenaj vortoj, cititaj de nia Redaktoro. Jam R. de *Saussure* kaj *Sentis* („*Kion bezonas Esperanto*”, 1916, k.a.) provis interakordigi tiujn vortojn; la konstatita haoso rezultas de pure etimologiaj kaŭzoj: latina apofonio, verboj kun du aŭ pluraj *stamoj* (terminoj proponita de prof. *Collinson* por nomi parton de vorto, kiu estas la fundamento en fleksiaj formoj kaj derivaĵoj; laŭ la tradukoj de *trunko* en germana, norvega kaj angla lingvoj kaj anstataŭ la tro vastsignifa *temo*, france *thème*. Vidu p. 15 en „*Elektitaj prelegoj de ISU*”, 1955).<sup>7)</sup>, ĉe-fine.

Normigon de tiuj nekonsekvencaj formoj malebligas la *Fundamento*, bazo de nia tradicio, kaj la neceso respekti la internaciecon, eĉ kiam ĝi trudus neregulaĵojn. Plie formdiverseco povas utili por distingi inter malsamaj signifoj: ekz-e *F. concevoir* = *koncepti* kaj *koncipi*!

Tamen la plej grava konstato estas, ke multaj vortoj, etimologie parencaj, delonge perdis en la romidaj lingvoj ajnan parencecon de la signifoj; tiu semantika fremdiĝo inter praderivitaj vortoj (*teni, abstini, ricevi, recepto*), ŝuldata al historiaj kaŭzoj, plene forprenas la praktikan utilon de ilia eventuala normigo. Sekve oni rezervas ĝin al la fakaj terminoj, kiuj urĝe bezonas konsekvencigon. Nur teorie formo kiel *konkiri*, analoga al *akiri*, kaj iam favorita de *Kabe* („*Vortaro de Esperanto*”, p. 83) ŝajnas preferinda<sup>6)</sup>. Tamen, ĉar ekzistas ne se-

<sup>5)</sup> Nur en Dec. 1958, per la 7-a *OA*, la Akademio decidis pri la fundamenteco de la radikoj, troveblaj en la *Fundamento* ekster *UV*, malgraŭ la *Antaŭparolo*, kie *Zamenhof* parolis pri „tri verkoj” kaj „*Aldono al la Fundamento*” — ne al *Universala Vortaro*!

<sup>6)</sup> Rektoro *Boirac*, prezidinto de l' Akademio, en la *Aldono* al „*Plena Vortaro E-Ea kaj E-franca*” (1910, p. 370) notis interkrampe post *konkiri* (citita el la pola vortaro de *Grabowski*), ke ĝi estas

mantika, sed nur etimologia rilato, kaj ĉar Z a m e n h o f preferis la francforman *konkeri* — ĉi-lasta sukcesis iĝi tradicia en nia lingvo; neniu sentas sin ĝenata de tio. (Ŝajnas ke ĝin unua uzis S e n t i s.)

Tute kontraŭe ĉe „*sovet*”: unu ĉeĥa esperantisto, A. F r a n t l, eĉ opinias, ke ĝi „estas malfacila, severe fonetike prenite preskaŭ neespri-mebla” („*Heroldo de Esperanto*”, No 1284, 1.IV.1959). Dum la Zamenhofeco kaj larĝa internacieco de „*sovjet*” pruvas, ke ĝi estas ĉial supera al la monstro „*sovet*”, fuŝa *kalkeo*<sup>7)</sup> (= vortpaŭsaĵo, laŭ A. F. *calque*, I. *calco*, R. *kal'ka*, k.a.), enkondukita de personoj, kiuj plene ignoris la menciitajn kriteriojn, kiujn mi opinias decidigaj. Kiam ekzistas neniu malhelpo, la internacieco en lingvo aŭtente internacia devas nepre triumfi, konforme al § 15 de nia *Fundamenta Gramatiko*, kiu pri fremdvortoj konsilas sekvi la „plimulton de la lingvoj”. Tiu plimulto ĝuste konas kaj uzas formojn analogajn al la tial ĝenerale akceptenda, korekta formo „*sovjet*”. La rusaj esperantistoj atentu tion ĉi!

ĝ) Pro la bezono de precizaj kaj internacie kompreneblaj terminoj en la lingvoscienco mi, spertinte la postulojn de tiufaka esplorado, ekhavis la ideon proponi terminojn vere utilajn en tiu disciplino; „*paŭsi*” ne konformiĝas al la diritaj kriterioj; ĝi estas ne-oficiala vorto, proponita de V e r a x („*Enciklopedia Vortareto*”, 1910, p. 178) kaj enlistigita ja nur en la *Suplemento* (1954) al la 4a eldono de „*Plena Vortaro*”<sup>8)</sup>, kie la troveblaj difinoj ne rilatas al lingvistiko.

Surbaze de la „*Leksikono*” (3a eld., 1951) de prof. M a r o u z e a u, kaj de aliaj fidindaj verkoj, mi nun preparas tutan fakvortaron, el kiu la proponataj terminoj *leksiko* kaj *kalkeo* (supre aplikitaj) estas nur ekzemploj, respondantaj al la konstatitaj postuloj en la lingva kampo.

„eble preferinda pro analogio al *akiri*”. Sed vasta internacieco per si mem mankas en ambaŭ kazoj. En la unua parto (1909) de sia *Vortaro* (je p. 165) B o i r a c indikis per steleto, ke li mem enkondukis *konker'i* (el S e n t i s, „*Urso en montoj*”, 1906). „*Konkir'i*” (kun referenco al *Vortaro franca-esperanta de la Presa Societo*, 1908) resendas al *konker'i*. Same „*konkvest'i*”, post kiu troviĝas demanda signo pro „la ebla vortludo: *konk-vesti*”.

<sup>7)</sup> En la dua parto (1910) de l' B o i r a c-*Vortaro* (p. 245) troviĝas „*paŭsi*”, kun referenco al „*Teknika Vortaro*” (t.e. „*Enciklopedia Vortareto*”, 1910) de V e r a x kaj kun jena difino: „*transkopii, transdesegni, dekalki*”; tiu ĉi lasta vorto aperas en la *Aldono de Boirac* (p. 354), kun referenco al la „*Vortaro polo[tiel!]-esperanta*” supre menciita (1910); tamen, por eviti ajnan eblecon de konfuzo kun la radiko *kalk'*, mi preferas uzi la francan infinitivon „*calquer*” (legu: *kalke'*) por formi Esperantan radikon kun fina vokalo homonimevita (analoge al *lupeo, moleo, paneo, steleo*). En la nova „*Franca-Esperanta Vortaro*” de R. L é g e r kaj A. A l b a u l t (1961) enestas jam *kalkeo*, lingvistika termino (p. 83), *leksiko* (= vorttuto; p. 320), kaj krome la formo *sovjeto* (p. 567), kaj la gramatikaĵo *temato* (p. 606), samsignifa kiel *stama* (uzita ĉi-supre, en postnoto g).

<sup>8)</sup> Kompreneble ankaŭ en la vortaroj kiuj referencas al V e r a x, kiel tiu de B o i r a c (supre menciita) kaj „*Dictionnaire Complet E-Français*” (1910; dua eldono kun referencoj, 1921), same kiel en tiuj bazitaj nur, aŭ ĉefe, sur *Plena Vortaro* (inkluzive de la *Suplemento*).

## LA VORTSPECOJ DE LA SUBJEKTA PREDIKATIVO KAJ DE LA PASIVA PARTICIPO

de R. LINSE

La subjekta *kvalita* predikativo estas ĉiam adjektivo, se la subjekto estas substantivo, pronomo, numeralo, adjektivo aŭ vorto iu ajn, pri kiu oni ion asertas, sed kiam la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, oni plimulte uzas adverbbon. Tamen ankaŭ adjektivo estas uzata, kaj tio kelkfoje de Z a m e n h o f.

En la frazo:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, tio estas por la afero tute egala*” oni ĉiam uzas adjektivan formon por la subjekta predikativo (*egala*) kiu determinas „*tio*” kiel anstataŭanton por la propozicio:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo*”

Per la demonstrativo *tio* la determinita propozicio estas emfazita. Forigo de la emfazo per subkompreno de *tio* ne kaŭzas ŝanĝon en la restanta frazo, la predikativo konservas sian adjektivan formon kaj ni havas:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, estas por la afero tute egala*” (Z.: Orig. Verk. 36/9).

Ni citu ankoraŭ kelkajn frazojn de Z a m e n h o f, en kiujn ni interkrampoj enkondukas la emfazan „*tio*”:

„*Sed kunligi jam antaŭe la sorton de l'lingvo internacia kun la estonta kongreso, (tio) estus tre malprudenta*” (O.V. 31/33).

„*Ĉu (tio) ne estas ebla, ke ni kompreniĝadu per alia lingvo*” (Hamleto, Akto V, Sceno 2), \*)

„*Por mi persone (tio) estus kompreneble pli oportuna teni la sorton de l'lingvo internacia en miaj manoj*” (O.V. 36/32).

(*Tio*) „*estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo*” (Leteroj de Z. II. 285/24).

Estas evidenta, ke oni ĉiam, kiel en la donitaj ekzemploj, povas uzi adjektivon kaj neniam bezonas uzi adverbbon kiel *kvalitan* predikativon, ankaŭ se la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, ĉar en la per *tio* emfazita frazo la adjektiva formo ja ĉiam estas korekta. Kelkaj ekzemploj kun konsekvenca uzo de adjektivo por la *kvalita* predikativo, sendepende de la speco de la subjekto, estas donataj en la tabelo sub 1.

\*) Citita el Paul F r u i c t i e r: *Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de S-ro D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj*, Paris 1903, Presa Esperantista Societo. En la antaŭparolo la aŭtoro diras, ke li uzis la unuajn eldonojn de tiuj verkoj, ĉar en ili ne estas alportitaj ŝanĝoj de aliaj personoj.